

Protokolo de la Komitato de ILEI

de la kunsido de la komitato dum la 44-a ILEI-Konferenco en Kopenhago (Danio),
la 18an de julio 2011, ekde 15.30.

1. La kunsidon gvidis ILEI-prezidanto Stefan MacGill. En la kunsido partoprenis komitatanoj el Belgio, Benino, Brazilo, Ĉinio, Finnlando, Francio, Germanio, Hungario, Japanio, Koreio, Kroatio, Nederlando, Pollando, Rumanio, Svedio kaj Usono. Post kontrolo de la nombro de ĉeestantaj kaj anstataŭigitaj komitatanoj estis konstatita kvorumo kun 25 voĉoj. La komitato akceptis la proponon, ke la ĉeestantaj LS-komitatanoj rajtu havi plurajn voĉojn laŭ la kunportitaj anstataŭigiloj. La komitato akceptis ke Rob Moerbeek rajtu esprimi voĉon por la dua nederlanda komitatano, kiu nur poste venos, sen formala deklaro. Tiel aldoniĝis kromaj voĉoj el
 - Francio, Nederlando kaj Rumanio po 1 voĉo
 - Germanio 4 voĉoj.Sume: 32 voĉoj, la komitatano el Benino komence forestis. Validaj voĉoj: 31.
2. Komitatanoj unuvoĉe akceptis la proponitan tagordon prezentitan de la estraro.
3. Oni akceptis Teresa Liberska kiel protokolanton por la nuna kunsid-serio.
4. SMG informis pri du akceptitaj retdecidoj el majo-junio 2011:
 - -pri modifo de la regularo pri Honoraj Membroj, kiun la komitatanoj akceptis per reta voĉdono, la komitato konfirmis per 30 voĉoj por, 1 sindeteno
 - pri mandato de la elekto-komisiono, la komitato konfirmis per 30 voĉoj por, 1 sindetenoVoĉdono pri la dumkonferencaj komisionoj: lerneja, statuta, universitata.
Dum la voĉdonado ĉiuj ĉeestantoj unuvoĉe akceptis la lernejan kaj la universitatan komisionojn; pri la statuta komisiono oni decidis dum la sekva kunsido.
5. Jarraporto pri la agado de ILEI en la jaro 2010: estis akceptitaj raportoj pri:
 - pasintjara konferenco: 29 – jes; 2 – sindetenoj;
 - instruista trejnado: 30- jes; 1- sindeteno;
 - translimaj lernejoj projektoj: 30 – jes; 1- sindeteno;
 - edukcentroj: 30-jes; 1- sindeteno;
 - registrado de lernejoj klasoj ĉe paĝaro edukado.net: 30 - jes; 1- sindeteno;
 - ekzamenoj: 27 - jes; 4- sindetenoj;
 - komitato: 30 – jes; 1 – sindeteno;
6. Financa jarraporto 2010 (prezentis Julia Batrakova):
 - post la diskuto oni akceptis la financan raporton por la jaro 2010 (29- jes; 2- sindetenoj).
7. Per la akcepto de la jarraporto kaj financraporto por la jaro 2010, oni samtempe senŝarĝigis la estraron de la 2010 jaro.

Sekvis kafopaŭzo – pro tio plilongigita kunsido akceptita. Post la paŭzo la komitatano el Benino alvenis. Validaj voĉoj: 32
8. Statutmodifoj: komitatanoj akceptis kelkajn modifojn en la statuto rilate al la enhavo
La voĉdonantoj havis la sekvajn voĉdonajn eblojn: *jes, ne; sindeteno; bezonas pli da diskutado.*

La rezulto de la voĉdono estis jena por la ŝanĝendaj punktoj el la listo de la *PowerPoint* prezentado projekciita surmuren al la komitatanoj:

por la punkto 4.1 (rimedoj por atingi la celojn): 32 voĉoj – jes, unuanime.

(propono pri novaj punktoj 4.2 kaj 4.3 prokrastita)

por la punkto 5.4.2 (rajtoj de membroj): 32 voĉoj – jes

por la punkto 7 (organiza strukturo): 32 voĉoj – jes

por la punkto 7.1.16 (rajtoj de komitatanoj): 32 voĉoj – jes

por la punkto 7.1.17 (rajtoj de komitatanoj): 27 voĉoj – jes; 1 – ne; 4 – sindetenoj

por la punkto 7.1.17 (pri du levitaj principaj demandoj):

la komitato esprimas preferon por kvorumo de duono kaze de retaj voĉdonoj, sed transigas ambaŭ demandojn al la komisiono. (32 voĉoj por tio)

por la punkto 7.1.18 (rajtoj de komitatanoj): 32 voĉoj – jes

por punkto 7.2.3 (estraj taskoj): propono: ĝi estu traktota far la statuta komisiono kaj estu decido pri ĝi post nova diskuto: 32 – jes;

por la punkto 7.3.2 (pri sekcioj): 30 – jes; 2 – sindetenoj;

por la punkto 7.3.5 (pri sekcioj): 32 – jes;

por la punkto 9.1 (pri regularoj): 32 – jes.

Per la voĉdonado pri la ŝanĝoj de la Statuto finiĝis la kunveno, je 17.45.